# La Letero

Espéranto Angers

2018 - 02

## Notenda sur viaj agendoj

La Ĝenerala Kunveno de Espéranto-Angers okazos
**SABATON LA 17-AN DE MARTO 2018 je 14h**
en "Centre Jean Vilar" (ĉe strato Henri Bergson, en kvartalo "La Roseraie"), en kunvenejo "Mot à Mot".
La membroj, iliaj familioj kaj iliaj amikoj estas invitataj al tiu simpatia jara kunveno
kun reĝkuko, amikuma kuntrinkado, libroservo.
Estas bonetosa nemaltrafinda momento !

---

## *"15 tagoj por la diferencoj"* *ĉe Le Trois-Mâts*



*La kvartaldomo « Les Trois-Mâts »*

La kvartala domo "Le 3-Mâts" (la trimastulo) en la anĝeva kvartalo "Les Justices" organizis dum du semajnoj diversajn kunvenojn kaj atelierojn favore al la loĝantoj, pri lingvoj kaj diferencoj. Nia grupo estis invitita por konigi la internacian lingvon Esperanto. Sabaton la 10-an de februaro 2018, tri membroj el nia asocio faris prezenton al kelkaj publikanoj, tamen tre interesataj. Interalie, paro venis kun sia infano, dekjaraĝa lernanto. Kune, post tiu prezentado kaj respondoj al diversaj demandoj, ni amuziĝis per ludkartoj, "memory" (ludo famkonata kaj adaptita por la esperanta lingvo). La infano gaje akceptis skribi mem, laŭ sia elekto, diversajn vortojn sur verdan balonon kiun li forprenis kiel donacon.

### La babiladoj pri la lingvoj kaj ties lernado :

**Merkredo 14-02-18 : « Kiu lingvo por vojaĝi ? »**
Kvar personoj (du el la Eo-grupo) partoprenis kun bonvolulo kaj profesiulo el la kvartala domo.
Ekde la komenco, partoprenanto parolas pri la angla lingvo, alia pri la franca, ankaŭ la hispana. Esperanto estas elvokita sed senkonvinke... La debato ekas tamen pri la malfacila regado koncerne tiujn lingvojn, pri la necesa memorado kaj la dezirinda komuniknivelo : utileca por turismumi aŭ pli fosita...
Jeanik parolas pri graveco de facile lernebla lingvo sen citi unun ; partoprenanto tiam parolas pri esperanto... post interŝanĝa momento koncerne niajn lingvajn spertojn, Arlette elvokas la rimedojn uzeblajn de la esperantistoj okaze de aŭ siaj vojaĝoj : delegitoj, Pasporta Servo...
diskuto komenciĝas per demando rilate al lingvo sen teritorio, kia kulturo ? Ktp.
Ne eblas plu profundigi la temon pro mallonga tempo disponebla.



**Vendredo 16-02-18 : « linvoj kaj utopioj »**
Ankaŭ kvar personoj (aliaj krom mi) partoprenis tiun paroladon kun la samaj personoj el la kvartala domo kaj eksterulo (instruisto) por enkonduki.
La eksterulo prezentas la temon elvokante nian konektitan mondon kaj la estontaj komunikaj eblecoj inter diverslingvaj personoj, dank'al la samtempaj tradukteknikoj. Tio jam eblas per la aktualaj iloj (komputiloj, saĝtelefonoj ktp.). Nuntempaj esploroj ebligus lokigon de elektronikaj ICoj por tuj havigi la taŭgajn vortojn al alilingva parolanto.
Partoprenantino elvokas Esperanton, unue malfavore, post paroloj de alia pri riskoj koncerne « ununuran » lingvon sed la du aliaj (pli junaj !) kontraŭe indikas ke esperanto povus esti interesa. La « eksterulo » tiam diras ke tiu lingvo pli disvolviĝas nun per la reto... (ĉar la profesiulo de la kvartala domo, rekonis min, li petis mian konfirmon kaj ateston !). Mi indikas ke mi travivas la praktikon de la esperanta lingvo ne kiel utopion kaj tiam parolas pri mia sperto.
La daŭro, ankaŭ mallonga, ne ebligis havi pli longan debaton.



Por fermi tiun festivalon "15 jours pour les différences" (15 tagoj por la diferencoj) koncertkabaredo estis organizita kun multaj intervenantoj (37) kiuj kantis, deklamis, rakontis poemojn; kelkaj anĝevanoj kantis en Esperanto. Cirkaŭ originala scenejo, ni estis invititaj forlasi niajn vojaĝvalizojn apud granda tergloba balono. Ni vojaĝis tra la kvin kontinentoj. Eta valizo iris de tablo al tablo, de Bretonio al Germanio, Rusio, Irano, Ĉinio, Meksikio, Brazilo, Afriko, Anglio, Italio, ktp... kaj al Esperantujo ! La etoso estis tute amika, frateca. Ĉiuj kune kantis kaj ni travivis belegan kulturan vesperon. Marianne, invitita kantistino, surprize proponis "Sen reveno" de la grupo Kajto kaj rakontis sian sperton pri vojaĝo al Rusio dank'al la Pasporta Servo.

## LA KURSO ĈE LA MUNICIPA INSTITUTO



*La Municipa Instituto de Angers*

Krom la kutimaj kursoj en kvartalo "La Roseraie", nova Esperanto-kurso A1-nivela (malkovro) al vi estas proponata en la Municipa Instituto de Angers, place Saint-Eloi :

La merkredojn de 18h30 ĝis 20h
14-an, 21-an, 28-an de **marto**, 4-an, 11-an, 18-an de **aprilo**,
16-an, 23-an kaj 30-an de **majo** 2018.

Kurso pagenda*. Maksimume 10 lernantoj.

* Tarifo normala 76,30€ / Tarifo kun karto "Partenaire" aŭ "Etudiant" 32,90€ / Tarifo rabata Angers 63€

Ĉiuj detaloj (francling vaj) sur tiu paĝo : cours espéranto

## ReVe 2018 : Unua Renkontiĝo Vegana en Esperantio !

**9a ĝis 13a de majo**
**En kastelo Greziljono**
**en Baŭĝeo (Baugé)**




**Plurfoje okazis Alternativa Semajno en Greziljono (KulturDomo de Eo, Francio) en pasintaj jaroj, dum somera periodo, kiam fojfoje aperis vegetarismo k veganismo kiel unu temo inter aliaj (ekologio, alimondismo, demokratio...). Ĉi foje ni havas okazon proponi 5-tagan programon, kun veganismo kiel centra temo. Ĝi okazos paralele al ĥorkanta staĝo de la grupo Interkant'.**
**En venonta majo, precize 09a-13a, okazos unuafoje ReVe, tio estas Renkontiĝo Vegana, malfermita al neveganoj kompreneble, k kiu ĉefe estos okazo en agrabla kadro malferme interŝanĝi pri politikaj implicoj de tiu vivelekto k praktike ĝin sperti (kun kuirkursoj surloke) dum 5 tagoj. Ankaŭ aliaj temoj estos traktitaj, k paralele al tio okazos staĝo pri ĥorkantado kun ne speciale vegana partoprenantaro, do ne timu retroviĝi meze de veganoj, ankaŭ estos multaj "normalaj" homoj.**

**Detalaj informoj haveblas rekte ĉe la retejo de Greziljono ĉe:**
**gresillon.org/reve**

**Notindas ke vendrede 11/05 koncertos Jonny M. Sabaton okazos la koncerto de Interkant'.**
**Eblas partopreni nur parte, loĝado laŭ kondiĉoj kutimaj de Greziljono, eblo tendumi.**

**Kontakto : Vito Markovo (kunorganizanto) 06 52 67 82 54 pimskrabo@yahoo.fr**